ANTAŬEN
suplemento de Informilo
3/28 septembro 2020

Enhavo: Saturnia; Preĝo por akvo

SATURNIA – la fabela banloko en Toskanio (Italio) , kreita de la Dio mem

Ĝuste en la koro de Italio oni povas trovi naturan banlokon de sanigaj fontoj, kie turkisa akvo en kontrasto kun blankaj ŝtonoj kreas spirithaltigan spektaklon.
En la mondo ekzistas lokoj, kiuj nin laŭvorte fascinas per sia beleco. Unu el ili estas sendube la itala urbeto Saturnia, kiu troviĝas en la toskana departamento, kaj kiu povas fieri pro termofonto kun bonfartigaj sanigaj efikoj. Kvankam en aliaj lokoj la termalaj fontoj estas uzataj por komercaj celoj (tie estas la eniro pagenda), en Saturnia estas la azuraj termakvoj alireblaj por ĉiu, kiu volas en ilin mergiĝi.

Verko de la dio Saturno

La termoriĉa regiono de Saturnia havas longan historion; ĝi ja estis konata jam en la etrusko-romia epoko. Eĉ al ĝi estas ligita mito eksplikanta la nomon. Oni rakontas, ke la dio Saturno, koleriĝinta pro la homa perfortemo, ĵetis sur la Teron fulmon, kiu kaŭzis krateron. El ĝi elŝprucis sulfura akvo kaj la regiono, honore al la dio, estis nomita Saturnia. Tiel naskiĝis la natura fenomeno, kies akvo kun konstanta temperaturo 37,5 Celsiusgrada, kun proksimume 500 litroj per sekunda trafluo-kvanto, ebligas rilaksadon al multaj homoj kaj havas ankaŭ bonfartigajn sanefikojn.

La termala minerala akvo en Saturnio havas pruveblajn kuracefikojn kaj kapablas mildigi simptomojn de multaj sanproblemoj, ekzemple de reŭmatismo, hipertensio, diversaj korinflamoj, pulmaj malsanoj kaj de hepat-koncernaj problemoj.
La klientoj de ĉi tiu bonfartiga loko ja devas superi fortan fiodoron de sulfuro, sed tio estas kompensata de la unika naturparadizo. La travideble blua koloro de la akvo, kombinita kun la

blankaj kalkoŝtonaj rokaĵoj ĉarmigas nepre ĉiujn dum la naĝado en la naturaj lagunoj.

El interreto tradukis partoprenantoj dum E-seminario.

Preĝo por Akvo

Anĝelo promenis sur Tero kaj konstatis, ke malplenaj estas multe da riverfluejoj, kaj la senakvaj estas ofte malpuraj, kun makuloj surface aŭ kun fluantaj forfalaĵoj meze de ondoj. La anĝelo ekploris kaj komencis preĝi kaj flugis al la Dio por peti helpon.

Dio eklaŭdis la anĝelon, sed kun bedaŭro levis la ŝultrojn kaj respondis: „Tion ĉion kulpis homoj. Homoj malpurigas riverojn, lagojn kaj marojn. Ili ne zorgas pri tio, ke la akvo malpliiĝas kaj la tuta ekvilibro de naturo estas per iliaj agoj pli kaj pli minacata.“

„Ordonu al ili, instruu ilin. Ne lasu tion tiel!“ malespere kriis la anĝelo.

Dio kapneis: „Mi donis al ili liberan volon. Mi povas nenion ordoni al ili.“

„Sed se tio plu daŭros tiel,“ ne kapitulacis la informanto, „malbone tio finiĝos. Eble finfiniĝos vivo sur Tero!“ rompiĝis la voĉo de la anĝelo pro senespero.

Dio suspiris, pripensis kaj poste diris: „Do, bone. Eble, kiam ili denove sentos sin minacataj, senpere ilian vivon, ili revalorigos tion, kio vere estas grava, kaj rekonsciiĝos, komencos konduti alimaniere. Mi ne ŝatas tion fari, sed vi pravas, eble jam estas tempo.“ Kaj li pugnigis siajn manojn, ion murmuris, poste levis la brakojn antaŭ si kaj kiam li liberigis la pugnojn, el liaj

manplatoj elflugis nur laŭ siaj okuloj videblaj malgrandaj estaĵetoj.
„Kio estas tio?“ surpriziĝis la anĝelo kaj rigardas post ili, kiel ili flugas malsupren al Tero.
„Nova malsano“, respondas tre malĝoje Dio.



Post la Preĝo sekvas ankoraŭ unu artikolo pri akvo – intervjuo de la raportisto Mik Adams kun D-ro Batmanghelidj, aŭtoro de la libro *Akvo por sano, kuracado, vivo*.
Interalie li diras, ke nia korpo enhavas 70 % da akvo. Ĝi estas ne nur en la sango kaj unuopaj organoj, sed ankaŭ en ĉiuj ĉeloj. Por bona sanstato tre gravas sufiĉe trinki por teni bonan nivelon de akvo. Ne sufiĉas trinki nur tiam, kiam ni soifas. Tio jam estas malfrue, ĉar tiam pro manko de la akvo nia korpo jam suferas. Senakveco subtenas ekeston de diversaj malsanoj. Por kompletigi la kvanton de akvo en nia korpo estas grave trinki 2-3 litrojn da akvo tage, en varmaj tagoj eĉ pli. Nur per spirado foriras el la korpo proksimume unu litro da akvo tage. Estas pli bone trinki puran akvon ol diversajn dolĉajn trinkaĵojn kaj alkoholaĵojn - tio tute ne helpas.

El revuo „NOVÝ FÉNIX“, n-ro 7-8 2020 tradukis
kaj el la sekva intervjuo elektis Josef Vojáček.